# *Fernando González reprezentis Kubon en la oficiala ceremonio por la paco en Tokio.*




La kuba heroo Fernando González Llort, vicprezidanto de la instituto de amikeco al la popoloj (ICAP), partoprenis en Tokio la agadojn por oma?i la 70-an datrevenon de la usona bombardado al la urboj Hiroshima kaj Nagazaki.

Oficiala komuniko diskonigita de la kuba ambasadejo en la japana ?efurbo, sciigis ke González reprezentis la insulon en la oficiala ceremonio kaj alparolis en la monda konfereco kontra? la atomaj kaj hidrogenaj bomboj, kie li pledis por malarmado kompleta, travidebla,  kontrolebla kaj nerenversebla.

La ceremonio okazis en la Memorialo de la Paco de Hiroshima, kaj ?in ceestis, interalie, la ?efministro japana Shinzo Abe kaj la altranga reprezentanto de UN por aferoj de malarmado, Kim Won-soo.

La kuba reprezentanto konfirmis la firman sintenon  de Kubo por totala elimino de la nukleaj armiloj.

Anta? amasa ?eestantaro el Japanio kaj aliaj mondpartoj, anka? parolis delegitoj de Germanio, Suda Koreio kaj ?inio, interalie.

La kariba insulo ?iujare estis reprezentata en tiu ?i grava evento, kiel rekono al sia historia kompromiso en la batalo kontra? tiu detrua armilo.

Fernando González, akompanate de la kuba ambasadoro en Japanio, Marco Rodríguez, plenumas ampleksan agadprogramon en Japanio, interalie, renkonti?ojn kun gvidantoj de la komunista partio japana, advokatoj, parlamentanoj kaj amikoj de Kubo, speciale tiuj kiuj subtenis la ka?zon de La Kvin, la kubaj kontra?teroristaj batalantoj kiuj suferis maljustajn punojn en usonaj karceroj, al kiuj li apartenis.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/64962-fernando-gonzalez-reprezentis-kubon-en-la-oficiala-ceremonio-por-la-paco-en-tokio

**Radio Habana Cuba**